



104-a jaro
N-ro 340
Marto 2012



BRAZILA KONGRESO EN TAGUATINGA

Kovrilo

Sur la kovrilo troviĝas foto de samideanoj, kiuj partoprenis la 47-an Brazilan Kongreson de Esperanto, okazinta en Taguatinga, Federaĉia Distrikto, de la 15-a ĝis la 19-a de januaro 2012.

- 03** Ĉefartikolo
- 04** Poemo: Nelson Pereira de Souza
- 05** Omaĝo: Maria Garcia Borges
- 06** Historio: Euripedes A. Barbosa
- 07** Eventoj
- 10** Literaturo: Adolpho de Miranda Silva
- 12** Eventoj
- 14** Novaĵo: Benedicto Silva
- 15** Intervjuo: Floriano Negreiros de V. Pessoa
- 17** Kroniko: BEL-Estraro
- 18** Forpasoj



Foto de partoprenantoj en la 47-a Brazilan Kongreso de Esperanto.

Eldiro

“Ĝis nun ĉiu esperantisto en la mondo laboras pro amo kaj ĝuste tial nia movado havas nevenkeblan spiritan forton, kiun mono ne povus doni.”

ISMAEL GOMES BRAGA (1891/1969), unu el la pioniroj de la brazila Esperanto-movado, verkisto, ĵurnalisto, poligloto, instruisto, eminenta kaj sindediĉa esperantisto.

Revukunlaboraĵoj: La ĉefredaktoro rigardas gravaj kunlaboraĵoj senditajn de la legantoj. Tamen, pro hommanko, spaclimigoj en la revuo, kaj kromaj limigoj, li rezervas al si la rajtojn: **1-e:** Ne sciigi la ricevon; **2-e:** Ne redoni la sendaĵojn; **3-e:** Ne garantii publikigon; **4-e:** Mallongigi tekston tiam, kiam necese; **5-e:** Ĝin reviziigi laŭ ortografia, gramatika kaj terminologia aspektoj. Kiel gramatikan konsultfonton ni rekomendas la verkon “Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko”, de Bertilo Wennergren. La signifon de ĉiuj vortoj netroveblaj en “Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto” (2005) oni aparte klarigu per glosaro.

Anonctarifoj: Tabelo pri prezoj (Brazila Esperantisto) Onoj de paĝo (anoncoj)

● Komercaj markoj reproduktitaj celas nur ilustri kaj apartenas al la posedantoj

tutpaĝa (19x25cm)
4-a kovrilo R\$ 900,00 (kolora)
2-a kaj 3-a kovriloj R\$ 600,00
(nigra-blankaj)

1/2 duonpaĝa (9x24cm)
R\$ 450,00 (kolora)
R\$ 300,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa horizontale
(8x18cm) R\$ 300,00 (kolora)
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa vertikale
(8x18cm) R\$ 300,00 (kolora)
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

1/6 sesonpaĝa (7.8x8.8cm)
R\$ 150,00 (kolora)
R\$ 100,00 (nigra-blanka)

BEL bezonas volontulojn

La nuna estraro de BEL sukcesis publikigi ekde sia enposteniĝo kvar numerojn de la revuo *Brazila Esperantisto*, malgraŭ la financaj malfacilaĵoj. Ni opinias, ke la revuo estas grava ilo por ke BEL alproksimiĝu al ĝia membraro, informante, klarigante kaj omaĝante valorajn esperantistojn. Ekzemple: ĉinumere ni omaĝas Maria Garcia, el Campo Grande, Mato Grosso do Sul, kaj Floriano Pessoa, el Rio de Janeiro. Ambaŭ kompetente aktivas por Esperanto antaŭ dekoj da jaroj.

Ni kaptas la okazon por aliafoje informi al niaj legantoj pri la manko de volontuloj ĉe nia sidejo. BEL bezonas kunlaborantojn por plibonigi siajn servojn. Anstataŭ plendi, la plej efika maniero solvi la problemojn estas labori kiel volontulo ĉe BEL. Kelkaj samideanoj opinias, ke en la sidejo de Brazila Esperanto-Ligo neniu bone laboras kaj ne zorgas pri la brazila Esperanto-movado. Tio estas eraro. Ĉi tie estas malmulte da helpantoj kaj amasa laboro.

La estraro de BEL konsideras, ke niaj naciaj kongresoj estas gravaj eventoj en nia movado. Ili enportas althumanajn rimedojn por proksimiĝo, interkompreno kaj krea kunlaboro inter la brazilaj esperantistoj. Ankoraŭ

estas necese, ke la esperanto-parolantoj renkontiĝu, por ke ili povu, en interna rondo, trakti siajn proprajn problemojn. Tiamaniere la movado plifortiĝas kaj solidiĝas. Pro tio, ni tre dankas al la lokokanoj de nia lasta kongreso, okazinta en Taguatinga, kiuj sukcesigis la 47-an BKE. La solena inaŭguro, ekzemple, estis impona kaj emocia.

Ni scias, ke la evento trudis multajn organizajn problemojn, malfacile solveblajn. Sed la membroj de la Loka Kongreso Komitato, gvidita de la junulo Evandro Ferreira Avellar, laboris senlace por la sukceso de tiu grava okazintaĵo. Ni opinias, ke nia venonta kongreso, en Barra do Garças, Mato Grosso, atingos same bonajn rezultatojn. Ciro kaj Amarílio jam komencis organizi belegan kongreson.

BEL-estraro ĵus ricevis dokumentaron koncerne la 46-an BKE, evento okazinta en São Paulo, en 2011. Pro tio, oni ne havis sufiĉe da tempo por prepari raporton pri la pasinta financa jaro. Maleblis aperiĝi ĝin en ĉi tiu numero de la revuo, sed poste oni publikigos tiun raporton en la junia numero de BE kaj en nia interreta paĝaro.

Fine, la estraro de BEL esperas, ke ĉijare ni laboru kune por superi la obstaklojn.



Brazila Esperanto-Ligo

Brazila Esperantisto

ISSN 0006-9477

Oficiala Organo de Brazila Esperanto-Ligo

Fondita en 1907 de Alberto A. Vieira, Reynaldo Geyer kaj Everardo Backheuser
104-a jaro - Junio 2011 - N-ro 337

Eldona Stabo

Respondeca ĵurnalisto: Viviane Castro

Ĉefredaktisto: Euripedes Alves Barbosa

Ĉi-numeraj kunlaborantoj: Benedicto Silva, Francisco Stefano Wechsler, Paulo Sérgio Vianna

Grafika aranĝo kaj enpaĝigo: Viviane Castro

Revizio kaj tradukado: Eldona Komisiono

Presejo: Gráfica Sergipe (Brasília/DF)

Kontribuajojn kaj mesaĝojn sendu al la retadreso de la ĉefredaktisto: euripedes-barbosa@ig.com.br

Pri la subskribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

Fondita en 1907

Sidejo SDS - Bloco P,36 - salas 301/303 - Ed. Venâncio III CEP 70393-902 - Brasília/DF
Telefono (0xx61) 3226 1298 Faksso (0xx61) 3226 4446

Retadreso bel@esperanto.org.br Hejmpaĝo www.esperanto.org.br

Estraro

Prezidanto S-ro Lício de Almeida Castro Vic-prezidanto S-ro Euripedes Alves Barbosa
1-a Sekretario S-ino Sufia Alves de Lima 2-a Sekretario S-ro Carlos Alfredo Aragón Guerreiro
3-a Sekretario S-ro Devanzio Apolinário dos Santos
Financa Direktoro vaka. Kasisto S-ro Darci Gomes Sardinha

Kontrolo Konsilantaro

Aymoré Vaz Pinto, José Carlos Dorini Ramos, Adolpho de Miranda Silva, Lia Milhomem Moreno,
Cieto Galvão da Silva, Evandro Ferreira de Avellar

Federacia Konsilantaro

Prezidanto S-ino Maria das Dores Góes

Komitatano-o-A Paulo Nascentes

Ĉefdelegito de UEA James Rezende Piton

Trista Kanto

Nelson Pereira de Souza

B
r
a
z
i
l
a

E
s
p
e
r
a
n
t
i
s
t
o

4

N
r
o

3
3
7

J
u
n

2
0
1
1

Pri kantoj - ne kantoj - mi ŝatus labori,
Kaj skribi pri amo, feliĉo, plezur' ;
sed devas mi tagon post tago esplori
Per kontoj, kalkuloj, bilanco, faktur' ...

Nu, kion mi faru? Ĉu devas mi plori,
Lamenti kaj plendi? Ne! Povas mi nur
en horoj liberaj trankvile ignori
La kontojn kaj... grimpi al muza la tur'.

Dum homoj dormadas tempeton mi trovas
Kaj mian suferon kantadi mi povas
en horoj silentas, per trista plorkanto.

Ho, muzo, min helpu! Fariĝu facila
La kanto plej bela, la verso plej brila
pri amo, frateco - do pri Esperanto!

NELSON PEREIRA DE SOUZA (1925/1986)

bankoficisto, preleganto, instruisto de Esperanto, eksprezidanto de Brazila Esperanto-Ligo.

Eminentaj virinoj en la Brazila Esperanto Movado

MARIA GARCIA BORGES

Maria Garcia Borges, filino de Epaminondas Alves Pereira kaj Abadia Garcia Pereira, naskiĝis en Campo Grande, ĉefurbo de la ŝtato Mato Grosso do Sul, Brazilo, la 4-an de novembro 1928. Ŝi estas la tria nepino de José Antônio Pereira, la fondinto de la urbo Campo Grande.

Maria Garcia konis Esperanton en la jaro 1949 pere de la flua parolado de Onézimo Costa e Faria, sed ŝi ekstudis la lingvon en 1956. La 28-an de septembro 1985, ŝi fondis la organizaĵon Esperanto - Societo Mato Grosso do Sul. En la jaro 2000, Maria Garcia ekgvidis Esperanto-kurson al la lernantoj de la 7-a kaj 8-a unuagradaj klasoj de la Lernejo Zamenhof. Aliflanke, ŝi okupiĝis pri instruado de Esperanto dum spiritismaj aranĝoj nomataj "Frateca Renkontiĝo Auta de Souza", inter kies lernantoj estis la komencanto Lício de Almeida Castro, nuna pre-

zidanto de BEL. Ŝi nun- en Spiritisma Federacio Maria Garcia organizis en Campo Grande en la 2010. Ŝi partoprenis plude Esperanto ekde 1957. Ŝi partoprenis en Brasília (2002). Laŭ Maria Garcia, gresoj esti aŭdi homojn el en Esperanto."

Profesie, Maria Garcia tino kaj estas ankaŭ tek- diplomita instruistino ekde 1949, kaj finis sian universitatan kurson pri Pedagogio en 1965. Ŝi poste faris aldonajn universitatajn kursojn pri edukado kaj komunikado en Brasília. Ĝis sia emeritiĝo ŝi laboris plurloke, kiel instruistino, lerneja direktorino kaj en gravaj administraj kaj komitataj taskoj. Ŝi ankaŭ laboris kiel ĵurnalistino kaj radiistino.

Kiel membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA), nia kara samideanino fariĝis delegito en Campo Grande kaj faka delegito pri manartaĵoj. Ŝi ankaŭ estas membro de Brazila Esperanto-Ligo (BEL).

Maria Garcia verkas poeziaĵojn kaj estas la aŭtorino de la poemo "Marĉeja lumbrilo", aperinta en Brazila Esperanta Parnaso, libro organizita de Sylla Chaves kaj Neide Barros Rego.

Fine oni venas al konkludo, ke Maria Garcia Borges fakte meritas ĉi tiun omaĝo, ĉar ŝi laboras senĉese kaj senlace por Esperanto antaŭ dekoj da jaroj. Dankegon, sinjorino Maria Garcia Borges.



Maria Garcia meze de la geedzoj Lício de A. Castro kaj Rosinete R. Ferreira Castro.

tenpe instruas la lingvon de Mato Grosso do Sul. kongresojn de Esperanto jaroj 1989, 1999 kaj en rajn brazilajn kongresojn Universalajn Kongresojn (1981) kaj en Fortaleza "neforgesebla en la kondiversaj landoj parolante

estas pedagogia instruistino pri Edukado. Ŝi estas

Framasona Loĝio Lazaro Zamenhof

Euripedes A. Barbosa

La Simbola Framasona Loĝio Lazaro Zamenhof 37 n-ro 80 estis fondita la 14-an de julio 1951, en la urbo Rio de Janeiro. La fondiĝon partoprenis la sekvantaj framasonoj: Délio Pereira de Souza, José Maria Lopes Henriques, Estevam Fernandes Moreira, José Braga de Macedo, Stelito José de Oliveira, Antônio Ferreira Lima, Luis Fraga Guimarães, Lenir de Paula Lopes, José da Rocha, Jayme J. Pina. Gvidis la kunsidon sinjoro Antônio Ferreira Lima. Kiu estis la sekretario? Nia neforgesebla samideano Délio Pereira de Souza. Fakte Délio estis framasono kaj manskribis la protokolon de tiu kunsido. Jam dum la solena inaŭguro Délio prelegis pri la vivo kaj verkaro de Zamenhof.

Délio esperantigis la unuagradan riton. Li ne perdis tempon. Nia laborema samideano estis peninta varbi framasonajn fratojn. Li ekinstruis Esperanton al kelkaj framasonoj de tiu Loĝio, sed la lernantoj ne profitis la okazon por bone lerni la lingvon. Pro la manko de intereso la kurso ne plu okazis. Nur Nelson vere interesiĝis pri Esperanto.

La Loĝio adoptis la verdan koloron kaj la kvinpintan stelon. De vidpunkto lingva ĝi ne plu rilatas al Esperanto, sed ĉiujare, okaze de la datreveno de la fondo, la anoj omaĝas Zamenhof, kiam ili prezentas verkaĵojn pri nia majstro.

Nuntempe, sinjoro Mário Mesquita estras la Loĝio Lazaro Zamenhof, kiu troviĝas ĉe la "Condomínio Maçônico Antônio Rodrigues Lopes", strato Mariz e Barros, n-ro 945, inter la Placo de la Flago kaj la Placo Saens Pena, Rio de Janeiro, kies kunsidoj okazas jaŭde, je la oka vespere.

Nia tre laborema samideano Délio Pereira de Souza eble fiaskis en la tasko varbi framasonojn al Esperanto. Aliflanke li plene atingis favorajn rezultatojn, ekzemple, la fondon de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro kaj de la Spiritisma Eldona Asocio F.V. Lorenz. Li ankaŭ tradukis plurajn verkojn en Esperanton, interalie, librojn de la filozofo Huberto Rohden.

Sendube Délio Pereira de Souza, kunfondinto de la Loĝio Lazaro Zamenhof, estis kompetenta esperantisto, kiu laboradis senĉese por nia kara afero dum preskaŭ 70 jaroj. Li naskiĝis en Rio de Janeiro la 23-an de decembro 1918 kaj forpasis la 2-an de januaro 2009, en la sama urbo. Li esperantistiĝis en la jaro 1941.

Brila Esperanto-Kongreso en Taguatinga

La 47-a Brazilia Kongreso de Esperanto, okazinta de la 15-a ĝis la 19-a de januaro 2012, en Taguatinga, Brazilo, estis plena de sukceso. Ĝi estis vere unuvorte BRILA! Al la kongreso aliĝis 250 samideanoj. Per multaj prelegoj, diskutadoj, muzikprezentadoj, teatraĵoj, ekskursoj, iom da lernado la kongresanoj fervore agadis. Samtempe kaj samloke okazis la 32-a Brazilia Esperantista Junulara Kongreso kaj la 10-a Infana Kongreseto. La Organiza Komitato laŭdinde plenumis sian taskon.

En la aŭditorio de la Kultura Centro de Taguaparko, la 15-an vespere, dimanĉe, okazis la impona, emocia kaj solena malfermo. Paulo Nascentes prelegis pri la temo de la evento "Renoviĝo de la Esperanto-Movado : Komunikado, Diskonigado kaj Edukado". Neide Barros kantis kaj deklamis. La paro Márcio André Carvalho kaj Lys Nardoto prezentis lirikajn kantojn. Laŭdinda estis ankaŭ la prezentado de Miquéias Paz, artisto (mimo) el Taguatinga.

La prelegoj, artaĵoj kaj laborkunsidoj okazis en la Lernejo nomata "Centro de Ensino Ave Branca", kiu troviĝas en la urbocentro. Ankaŭ en la sama loko, oni organizis Festivalon pri Indiĝenaj Lingvoj, la 15-an de januaro. Prelegis nia samideano Osmar da Silva Alves pri la temo: Kuriozaĵoj pri la Tupia Lingvo. Siavice s-ro Cleber Buzzato, sekretario de la "Conselho Indigenista Missionário" (CIMI) paroladis pri Brazilaj Indiĝenaj Lingvoj.

Nenio povas montri la neceson, taŭgecon kaj disvastiĝon de la Internacia Lingvo pli bone ol ĝuste aranĝita ekspozicio. De la 9-a ĝis la 19-a de januaro 2012 oni starigis ekspozicion pri Esperanto ĉe Metroo-stacio Praça do Relógio (Placo de la Horloĝo), en Taguatinga. Ĝin organizis la samideanino Maria das Dores Barcellos. Tie estis du grandaj paneloj montrante allogajn informojn pri nia lingvo.

En la 6-a, lunde, membroj de Brazilia Esperanto-Ligo kunsidis, kiam ili pri-traktis diversajn aferojn, inkluzive estis aprobitaj la oficialaj regularoj de BEL kaj de la Eduka Komisiono. La partoprenantoj decidis ankaŭ pri la venonta nacia kongreso, kiu okazos en la urbo Barra do Garças, ŝtato Mato Grosso, en januaro 2013.

Elstarigis debato pri la temo de la kongreso, kies partoprenantoj akceptis la jenan rezolucion.

REZOLUCIO

Ni, la partoprenantoj en la 47-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj 32-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso, venintaj al Tagvatingo el 18 brazilaj ŝtatoj (AM, BA, CE, DF, ES, GO, MG, MS, MT, PA, PB, PR, RJ, RN, RS, SC, SE, SP) kaj el la landoj Belgio, Germanio, Portugalio, Pollando kaj Serbio, por komune dialogi pri la renovigado de la Esperanto-movado en Brazilo, ĉefe rilate al la ĝiaj edukada, komunikada kaj diskonigada flankoj, rezolucias, ke esperantistoj, individue kaj institucie, devas, pro la grandeco de la ĉiam vokanta laboro kaj pro la malgrandeco de la nombro da laboremuloj, klopodi agi pragmatisme kaj en simplaj, portempaj kaj malfermaj laborgrupoj, kun la celo helpi kaj riĉigi la agadon de la Brazila Esperanto-Ligo (BEL), ĉefrepresentanto de Esperanto kaj de ĝia movado en Brazilo; la movado devas agigi kune siajn veteranan kaj junularan flankojn, tiel ke la junularo helpu ĉefe pere de interretaj agadoj kaj novaj ideoj, cele al vastaj komunikado kaj diskonigado, dum la veteranoj, ĉefe pere de la konigo de oficialaj devoj kaj funkciado de BEL, cele al la partoprenigo kaj trejnigo de la junuloj; rilate al la Projekto de Leĝo "Cristóvam", antaŭ la du ĉefaj defioj de ĝi starigitaj, nome la kompetentigo de Esperanto-instruistoj kaj la instigo al la Esperanto-lernado por la socio, ĉefe la junularo, oni devas

1) zorgi pri la propono krei laborgrupon en BEL, ĉefe por pritrakti

- a) la specialistigon pri Esperanto de neesperantistaj instruistoj de fremdaj lingvoj,
- b) la trejnigon de esperantistaj instruistoj de fremdaj lingvoj kaj
- c) la formadon de novaj instruistoj pri Esperanto; kaj


2) plenumi la proponon instigi homojn lerni kaj apogi la lernadon de Esperanto, specife pere de la Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) kaj ties allogaj agadoj al la junularo, kiel la Projekto BEJO-ataŝeo kaj diversaj apogoj al studado ekster Brazilo; taŭgas krei laborgrupon por diskonigi aŭ prizorgi la edukadon de infanoj inter 6 kaj 12 jaroj ene de la sociaj valoroj de Esperanto por la mondcivitaneco; endas plifirmigi la rilatojn de BEL kun siaj ŝtataj reprezentantoj, kiuj lastatempe malfortiĝas, cele al la revigligo de lokaj movadoj kaj pliefikigo de loka komunikado; indas atentigi esperantistojn, ke ili povas agi individue por diskonigi Esperanton, tamen pli bone laŭ trafaj strategioj komune priveditaj; kaj fine oni devas igi deviga specialan kunvenon en ĉiuj kongresoj por legi la antaŭan rezolucion, skribi novan kaj prezenti ĝin en solena fermo.

SCENOS EL LA 47-a BKE



La antaŭsciigo pri la morto

Verkis Adolpho de Miranda Silva
El portugala tradukis Benedicto Silva



Kiom da tempo li vivos plu?

Kiom longe lia vivo ankoraŭ daŭros?

La statistikoj atentigis lin pri tio, ke averaĝe la longviveco de gento de lia regiono estis de 56 ĝis 58 jaroj, kaj do lia espero plu vivadi limiĝis je nur 6 ĝis 8 jaroj.

Sed li konis virojn, aĝantaj pli ol 80 jarojn, kiuj tamen estis sanaj kaj elegantaj.

Tiam li rememorigis pri Dio, kaj per fervora preĝo, ĉar li estis denaska kristano, li petis la Ĉiopovan antaŭsciigi lin pri la alproksimiĝo de la morto, ne nur por ke li psikologie sin preparu por la okazo, sed ĉefe por aranĝi siajn aferojn, evitigante al siaj posteuloj materiajn problemojn.

Kredema, li fide vivis plu...

Dudek du jaroj rapide forfluis.

lun printempan posttagmezon io nekutima okazis.

Atinginte duonon de la surtera vivo, iu viro, honesta kaj bonkora, komencis pensi pri sia vivado.

Ĝis tiam li vivis feliĉa, ordinare sana, estante bona edzo, bona filo, kaj nun opiniis sin ekzempla patro.

Sufiĉe bonsukcesa en sia profesio, li neniam spertis ajnan momenton de financa krizo, kaj liajn monrimedoj, havitaj per ofta, sistema ŝparado, ĉar li neniam misuzis sian monon, estante modera ĉe aĉetado, ĉio certigas al li bonstatan maljunecon.

Io tamen malkvietigis lian pensadon.

Promenante sur la trotuaro de sia strato, jen li subite delasis la bastonon, subtenantan lian staron, kaj peze falis sur la krurojn, mortante.

Li estis ja bona viro. Helpate de najbaroj, li estis kondukita senviva al hejmo, kaj tie estis faritaj unu post alia la paŝoj por la funebra ceremonio.

Post la periodo de la spirita vekigo en la astralo, jen li vekigas antaŭ sendita de la Kreinto, sendito tiel pura kaj radianta, ke li opiniis, ke tiu estas Dio mem, kaj li tuj ekplendis:

- Per preĝvortoj mi petegis, ke mi estu antaŭsciigita pri mia morto, sed tamen mi subite mortis, kaj des pli malbone: sur trotuaro, falante sursstrate, tute humiligite.

Kaj li estis daŭrigonta per akra tono en sia malkontenteco, kiam lin interrompis la sendito, dirante:

- Ne estu malsaĝa. Vi malprave kolerkriegas. Aŭskultu min:

- Nia Ĉiela Patro komisiis al mi antaŭsciigi vin pri la alproksimiĝo de via morto, kaj mi tion faris ekde via kvindekjaraĝo, sed vin ne volis aŭskulti min.

La sekvan tagon post via 50-jara datreveno mi komencis averti vin per blankaj haroj, kiujn mi intermetis en

vian hararon; vi ilin negrigis.

Mi kariigis viajn dentojn, rompis kaj elfaligis ilin, kun la celo vin averti, sed vi ekuzis falsan dentaron.

Mi faltis vian kolon kaj vangojn, sed vi faris plastian operacion.

Mi malpliigis vian vidkapablon, sed vi aĉetis okulvitrojn.

Mi difektis vian sangocirkuladon, estigante sklerozon ĉe viaj arterioj, sed vi farigis kirurgion per safena vejno.

Fine, mi forprenis la fortojn de viaj dikmuskolaj kruroj, kaŭzante eĉ kramfon, kaj vi provizis vin per bastono.

Mi tute ne estas kondamnanta viajn sintenojn; mi diras tion ĉi nur por montri al vi, ke ne pravas viaj blasfemoj kontraŭ Dio.

Vi nur ne komprenis la diajn inspirojn de la Superega Saĝo.

Ripozu nun, vi ja vivos plu.

La sendito malaperis.

La suno de la eterneco briladis plu.

48-a BKE - BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

33-a BEJK - BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA KONGRESO

11-a BIKE - BRAZILA INFANA KONGRESETO DE ESPERANTO

*BRAZILA GEODEZIA CENTRO
GRANDA BARRA*

BARRA DO GARÇAS (MT), PONTAL DO ARAGUAIA (MT) KAJ ARAGARÇAS (GO)

GRANDA "BARRA" estas urba komplekso kunigita de municipa trio integrita de la Matogrosaj urboj Barra do Garças kaj Pontal do Araguaia kaj Gojasa urbo Aragarças. Tiuj urboj inkrustiĝas ĉe la Brazila Geodezia Centro, ene de la biomo "Cerrado" – speco de brazila savano - meze de distingaj ekologiaj monumentoj tiaj, kiaj: riveretoj, riveroj, montaro, montoj, ebenaĵoj, belaj akvofaloj, varmaj akvoj kaj enhavoriĉa flaŭra kaj faŭna biodiverseco, elstariĝante la homa diverseco konsistigita de indiĝenaj nacioj, afriko-devenantoj kaj ne-afro-indiĝenoj el ĉiuj regionoj de la Lando; diverseco tia, transdonanta al tiuj urboj, riĉan scenejan plastecon el eksterordinara beleco.

Barra do Garças kaj Aragarças estas historiaj urboj gravaj al proceso pri okupado de tiam brazilaj senhomaj enlandaj regionoj de la 40-aj jaroj de la 20-a jarcento; tiam, kiam eksplodis

la Dua Granda Monda Milito kaj motivis la aperon de du grandaj programoj de la Federala Registaro: La reliefigita "Marcha para o Oeste" (Marŝado al la Ŭesto) kaj la heroo "Expedição Roncador-Xingu" (Ekspedicio Roncador-Xingu) de la brazilaj prezidentoj Getúlio Vargas kaj Juscelino Kubistcheck de Oliveira, kiuj malfermis spacojn kaj fiskajn incentivojn cele okupadon de Amazona kaj Okcidenta Regionoj de Brazilo, tiam grave minacata el internacia okupado, kies faktoro havis fundamentan rolon je la program-ple-numado. inkluzive influante la urĝan translokigon de la Landa Respublika Ĉefurbo de Rio de Janeiro al Brazila Centra Altebenaĵo: Braziljo.

La Gojasa urbo Aragarças fariĝis sidejo de la "Fundação Brasil Central" (Fondaĵo Brazil-Centro) – administra organo de "Marŝado al la Ŭesto" kaj de la "Ekspedicio Roncador-Xingu" - kaj la Matogrosa urbo Barra do Garças, iĝis

la “Portal Leste Aberto da Amazônia” (Malferma Orienta Portalo de Amazona Regiono), tra kie dum jardekoj efektiviĝis la okupado de tiu forgesita brazila regiono. Jardekoj post la urbo Pontal do Araguaia emancipiĝis, enlokiĝigante interrivere ĉe la bordoj de la riveroj Garças kaj Araguaia. Tiu prospera municipa trio, riĉa je naturaj belecoj, kiu - krom terkultivo, besto-kultivo - tiuj urboj havas komune fortan inklinon al turismo kultura, ekologia kaj sporta, same kiel valorigo de la klerigada, havante diversajn publikajn kaj privatajn universitatojn ofertantaj dekojn da kursoj pri diversaj ago-kampoj.

Tiu municipa trio estos la gastigejo de la 48-a Brazila Kongreso de Esperanto, de la 33-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso kaj de la 11-a Brazila Infana Kongreseto de Esperanto, samtempe okazonta dum la periodo de la 18-a ĝis la 22-a de januaro 2013. Brazila Esperanto-Ligo, Federacio Matogrosa de Esperanto kaj Lingvistiko, Societo Gardantoj de la Tero kaj Urbestroj de la Municipa Trio kaj la Loka Kongresa Komisiono havas egan plezuron akcepti ĉiujn en la Granda Barra: Barra do Garças (MT) – Ponto do Araguaia (MT) kaj Aragarças (GO).

ESTU BONVENAJ!



Fotoj de la urbo Barra do Garças.



Amarílio prezentos teatraĵon en Vjetnamio

B
r
a
z
i
l
a

E
s
p
e
r
a
n
t
i
s
t
o



Amarílio de Carvalho rolas kiel Tiradentes.

Amarílio Hévia de Carvalho, 78-jara, membro de UEA kaj de BEL, estas tre konata brazila esperantisto, ne nur pro la vendado de ĉemizoj dum naciaj kongresoj, sed ankaŭ pro aliaj agoj en nia movado. Li estas malnova esperantisto. Ekzemple, li aktivis ĉe Brazila Klubo Esperanto en la 1950-aj jaroj, en Rio de Janeiro. Amarílio estis dua sekretario de tiu organizaĵo dum la ofiĉperiodo 1956/1957. En la 1970-aj jaroj li laboris ĉe Kultura Kooperativo de Esperantistoj, ankaŭ en

14

Rio de Janeiro.

Amarílio instruis Esperanton en Niteroi ĉe la strato Leite Ribeiro n-ro 102 kaj en aliaj urboj, nome: Rio de Janeiro, Valença kaj Barra Mansa, sub la aŭspicio de Kultura Kooperativo de Esperantistoj.

Li venkis en la oratora konkurso organizita de BEL kaj okazinta kadre de la XIX Brazila Kongreso de Esperanto (Rio de Janeiro, 1965). En 1979, Amarílio estis intervjuita de la fama artisto Carlos Imperial, dum programo de TV-Rio, kiam li respondis demandojn pri Esperanto.

Amarílio plurfoje gvidis artan vesperon okaze de niaj brazilaj kongresoj. Li ankaŭ estas aktoro. En la teatra kampo, Amarílio aktoras, reĝisoras, verkas kaj instruas. Kune kun Álvaro Bueno, Braz Consenza, Laura Alcântara, Sebastião Campelo, Jair Sales rolis en la teatraĵo "Conspiração Mineira", verkita de Lima Cipollati originale en Esperanto. Tiu prezentaĵo okazis la 25-an de oktobro 1982, en la Teatro Artur Azevedo (Campo Grande - Rio de Janeiro). Amarílio nuntempe prezentas tra Brazilo la monologon "Joaquim José - Fidoplena Martiro". Temas pri la vivo de Tiradentes, kiu estas historia figuro de nia lando.

Amarílio kaj Ciro Gomes de Freitas respondecas pri la organizado de la 48-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazonta en la urbo Barra do Garças, ŝtato Mato Grosso, en januaro 2013.

Fine, jen rimarkinda afero: Amarílio deziras vojaĝi al Hanoj, Vjetnamio, por prezenti, okaze de la 97-a Universala Kongreso de Esperanto, la menciitan monologon. Pro tio li bezonas monhelpon de nia samideanaro. Ni helpu lin.


N
r
o

3
3
7

J
u
n

2
0
1
1

Floriano Negreiros de V. Pessoa



Brazila Esperantisto - Kiu estas Florian Pes- soa?

Brazila esperantisto, emerita kemia inĝeniero, du filoj kaj kvin genepoj. Naskiĝis en Amazono, sed de multaj jardekoj loĝas en Rio de Janeiro. Dum multaj jaroj, instruisto de Esperanto ĉe BEL, en Radio Roquete Pinto, en Instituto por blinduloj de Rio, kaj en kursoj per korespondado, en niveloj elementa, supera kaj profesora. Nuntempe ofte prelegas en kongresoj kaj artikolas por la gazetaro.

B.E. - Kiamaniere vi ekkonis Esperanton?

Mi konatiĝis kun Esperanto dum la vojaĝo, kiun mi faris, por transloĝiĝi de Manaus al Rio: la ŝipo haltis plurloke, interalie en Recife, Pernambuko. En tiu urbo, mi promene pasis preter librovendejo, en kies monro-fenestro troviĝis Esperanta lernolibreto. Mi aĉetis la libreton, kiun mi ankoraŭ ĵaluze konservas: "Primeiro Manual de Esperanto", portugalen tradukita de Ismael Gomes Braga, el la franca eldono de Librairie Centrale Esperantiste. Foliumante la libreton, mi trovis la enhavon tre interesa, tamen devis kelkan tempon rezigni pri ĝi, pro la nepra neceso atenti la eniro-ekzamenon al la universitato.

Kelkajn monatojn poste, jam en 1954, mi unuafoje vizitis la sidejon de Brazila Esperanto-Ligo, Praça da República, 54, Rio, kie mi vere debutis kiel esperantisto kaj, je la unua fojo aŭdis la internacian lingvon, ĉar ankaŭ ĉeestis pastro Kao, ĉina katolika religiulo, kiu vigle parolis, en Esperanto, kun la tiama prezidanto Carlos Domingues.

B.E. - Kiel vi lernis Esperanton tiel profunde?

Se diri la veron, mi timas, ke via demando enhavas ĝentilan troigan aprezon pri mia lingva kompetenteco, sed mi volonte raportos, kiel mi perfektigis en Esperanto: la lernado okazis, kaj plue fariĝas, per atenta legado, ne nur de lernolibroj kaj vortaroj, sed ĉefe de bonstilaj verkistoj kaj precipe de klasikaj aŭtoroj. La komparado de tradukoj kaj de iliaj originaloj ankaŭ estas potenca progresiga forto. Kaj, kompreneble, la ofta, ĉiutaga uzado de la lingvo, ekzemple per la komputila reto, kaj kontaktoj kun tutmondaj samideanoj, en kongresoj kaj renkontiĝoj, tio kompletigas la lerno-

-procezon

B.E. - Rakontu viajn spertojn en la tradukarto.

Ne estas necese insisti pri la graveco de tradukado, por la progreso de Esperanto; sufiĉas rememori la konsilon de Zamenhof en la "Lingvaj respondoj": "estas tre dezirinde, ke ni ne evitu malfacilajn tradukojn, sed kontraŭe, ke ni ilin serĉu kaj venku, ĉar nur tiamaniere nia lingvo plene ellaboriĝos."

Necesa, jes. Ĉu facila? Mi prefere transdonu la parolon al Waringhien, en unu el liaj eseoj: "Por originala verkado. sufiĉas laboro kaj talento; por tradukado, laboro, talento, dulliingveco, gusto, kapablo interpreti alies verkojn, altgrada semantika sentemo." Kaj tamen multaj homoj oferas sian tempon kaj energion al la traduka laborado. Kial? Ni vidu la klarigon de Kolomano Kalocsay, princo de la Esperantaj poetoj, versa tradukinto de la Infero de Dante:

"Ne ekzistas aŭtoro pli malfacile tradukebla ol Dante. Sed ĝuste ĉi tiu malfacileco, kiel la ĉarmoj de nekonkerebla virino, havas tian altiran forton, ke grandaj lingvo-artistoj oferis al ĝi grandan parton de sia vivo kaj forto, pluraj eĉ sian tutan vivon".

La temo estas do tre vasta kaj ne entenebla en tia nelonga intervjuo. Mi pli detale traktis ĝin en prelegoj faritaj en la brazilaj kongresoj en Campinas, Campo Grande kaj Kongreso de San-Paŭlo en Lorena. Krome, kelkaj tradukoj miaj, ekzemple "Fina alvoko", "La hirundoj de Campinas, "Egaleco" , troviĝas disemite en nia gazetaro.

16 B.E. - Vi aktivis en Brazla Klubo Esperanto, Rio de Janeiro, inkluzive instruante Esperanton. Bonvolu resumi la historion de tiu klubo, kaj respondi la demandon: kial kaj kiam la klubo malaperis?

"Brazila Klubo Esperanto" estis fondita en Rio de Janeiro, en 1906, unu jaron antaŭ la fondo de Brazila Esperanto-Ligo, sekve de la granda sukceso de Esperanto-kurso tiam donata de Everardo Backheuser, per la ĵurnalo "O Paiz". La klubo vigle funkciadis dum multaj jardekoj, sed iom post iom perdis siajn membrojn kaj kunlaborantojn; mankis mono kaj homoj foriris al aliaj societoj. Kaj BEL mem, kunloĝantino de BKE, iris loĝi en Braziljo, kaj jen kuriozaĵo: Teorie la klubo ankoraŭ ekzistas, ĉar nenia dokumento traktas pri ĝia malfondo.

B.E. - Ni scias, ke vi partoprenas en la Brazilaj Kongresoj de Esperanto. Kion vi opinias pri tiaj kongresoj?

Mi supozas, ke la kongresoj precipe celas fortikigi la solidarecon inter la esperantistoj, studi kaj solvi problemojn de la movado, por ĝin progresigi, kaj montri Esperanton al la mondo. Miaopinio la unua celo preskaŭ ĉiam estas atingata; en la dua, jen ni sukcesas, jen ne. La tria estas nia plej malforta flanko. Kongresoj multe stimulas kaj entuziasmigas la esperantistan junularon. Eble tio sufiĉas por ilin pravigi.

B.E. - Kiuj estas viaj planoj rilate Esperanton?

Mi planas, ankoraŭ ĉi-jare, eldoni kolekton de verkaĵoj miaj: prelegoj, artikoloj, versoj, kvizoj, tradukoj, kiuj neniam aperis libroforme. Cetere, mi intencas daŭrigi mian kunlaboron kun la Esperanta gazetaro, interalie kun la nova revuo "Facila vento". Kiam invitate, prelegi en Esperantaj eventoj, unuvorte, movadumi.

Brazila Kroniko

BEL-Estraro

Kio okazas en via Regiono AERJ



Datrevena festo por la 70-jaroj de AERJ
Notu sur via agendo!

En la sama tago de la datreveno de **Asocio Esperantista** de Rio de Janeiro – AERJ – la 30-an de marto, 2012 ĉe Kultura Centro de Federala Justeco (www.ccfj.trf2.gov.br).

Akceptado: de post la 5-a posttagmeze
Solena marfermo: la 6-a vespere
Ĉiuj estas invititaj!

Pliaj informoj pri Programo de la Evento estas disvastigota sed nia kunfratiĝo certe okazos.

Laŭ Walter Fontes – AERJ

Brazila Renkontiĝo de Esperantistoj-Spiritistoj



Brazila Asocio de Esperantistaj-Spiritistoj (BAES) realigis la 6-an **Brazilan Renkontiĝon de Esperantistoj-Spiritistoj (BRES)**, la 19-an kaj la 20-an de januaro 2012, ĉe la spiritis-

ma centro nomata Casa do Caminho, en la urbo Taguatinga, Federacia Distrikto.

La solena malfermo okazis la 19-an je la 8-a vespere, kun muzika prezentado de la grupo Nova Erao kaj kun la prelego de José Passini pri la temo: La mediumeco tra la epokoj.

En la sekva tago, prelegis eminentaj esperantistoj-spiritistoj, jene: Elmir dos Santos Lima (Rio de Janeiro) pri Ekster karito, nenia savo; Maria Ester Pinto de Souza (Braziljo) pri Reenkarniĝo - Eduka vojo; João José dos Santos (Portugalia) pri Identeco kaj **Ĉeesto de Kamilo Kastelo Branko en la Lando de la Lumo** kaj pri **Evangelio, Spiritismo kaj Esperanto**; José Passini (Juiz de Fora) pri **La reenkarnejo laŭ la spiritisma vidpunkto**; Enivaldo Alves da Silva (Brasília) pri **La sublima triangulo - Scienco, Filozofio kaj Religio**; Lício de Almeida Castro (Brasília) pri **Esperanto kiel revelacio**; João Silva dos Santos (Rio de Janeiro) okupiĝis pri la temo: **La afero Esperanto en la verkoj Memoraĵoj de sinmortiginto**.

Post la prelegoj okazis la **Ĝenerala Asembleo** de BAES, kiam la prezidanto Waldir Silvestre raportis pri la administraj kaj financaj aspektoj de la aktiveco de la asocio dum la jaro 2011. Fine la partoprenantoj elektis la novan estraron de BAES. Jen la estraro:

Waldir Silvestre - prezidanto;

Sandro M. Alves - vicprezidanto;

Ary Lima Haine - Kasisto;

Wilson Álvares de Oliveira - unua sekretario; kaj

Carlos Maria - dua sekretario.

Laŭ Euripedes Alves Barbosa





LUIS HENRIQUE RODRIGUES DE ARAÚJO

Post longa kancero forpasis la 10-an de januaro 2012, 58-jara, la advokato Luis Henrique Rodrigues de Araújo, kiu lernis Esperanton komence de la 1990-aj jaroj.

En 1993 li fariĝis prezidanto de la ĵus fondinta Esperanto-Grupo Verda Lumo, situanta en la norda regiono de la urbo San-Paŭlo. Post du jaroj, li estis elektita la unua prezidanto de Pirituba Esperanto-Grupo, troviĝanta en la nordokcidenta regiono de la urbo.

Li membriĝis al Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP) en 1992 kaj en 2010 li fariĝis konsilanto de la Asocio.

Inter liaj ŝatataj okupoj, plej konataj estis kanto kaj ludado de gitaro, per kiuj li kutime regalas amikojn kaj samideanojn, okaze de lokaj esperantaj aranĝoj. Lia lasta prezento, en esperanta rondo, okazis en januaro 2011, kadre de la 62-a fondaatreveno de Esperanta Klubo Zamenhof, en la orienta parto de la urbo San-Paŭlo.

IVO SANGUINETTI

La 10-an de januaro 2012 forpasis en la urbo Porto Alegre nia kara samideano Ivo Sanguinetti, 87-jara, kaj la entombigo okazis en la Tombejo São Miguel e Almas, Porto Alegre.

Ivo naskiĝis en Porto Alegre, Rio Grande do Sul, la 28-an de aŭgusto 1924. Li estis emerita arkitekto kaj ĵurnalisto. En 1953 Ivo diplomiĝis pri Arkitekturo ĉe la Federacia Universitato de Rio Grande do Sul.

Lerninte Esperanton en 1947, Ivo estis dum longa tempo aktiva sur loka nivelo. Fakte li estis prezidanto de Esperanta Societo de Porto Alegre dum du oficperiodoj kaj prezidanto de Gaŭĉa Esperanto-Asocio, de 1982 ĝis 1986 kaj de 1986 ĝis 2001. Sur landa nivelo li estis vicprezidanto de Brazila Konsilantaro de Esperanto.


Ivo estis fakdelegito de UEA pri turismo kaj verkis la jenajn librojn: Antono Ĉimango (versoj), Gaŭĉa Rakontaro (rakontoj), Ĝaŭĉa Vortaro kaj Vojaĝante per 8 lingvoj. Li ankaŭ tradukis esperanten la himnon de Rio Grande do Sul. De 1948 ĝis 1953, li skribis esperantan sektion en la revuo Idade Nova. Kune kun Alberto Flores, Ivo verkis pri la historio de Esperanto en la urbo Porto Alegre.

En 2009 forpasis la sinjorinon Isaura, edzino de Ivo. Ambaŭ havis tri gefilojn: Ivanice, Ivo José kaj Ivânio.

La ĵurnalo Zero Hora publikigis la nekrologon de Ivo Sanguinetti, la 14-an de januaro 2012. Lia nomo sendube restos ĉiam ligita kun la Esperanto-movado en Rio Grande do Sul.




Libroservo de Brazilia Esperanto-Ligo




107 Krucenigmoj en Esperanto
Stano Marček




Dicionário completo Esperanto/Português
Allan Kardec Afonso Costa



Novo dicionário Português/Esperanto
Allan Kardec Afonso Costa




Dicionário Esperanto/Português
Ismael Gomes Braga




Homaj Rajtoj
Leah Levin



Inocenta
Alfredo Taunay



Oportuna Poŝvortaro
Sylla Chaves



A Rua Zamenhof
Roman Dobrzynski

KONGRESA URBO 2013

